

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

16-paĝa

revuo enhavas malpli da materialo ol unu numero de

ET!

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Fleletona red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekkonto Köln 70865,
por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
el ĉiuj landoj 5 germ. mk.,
po cm², ĉe grandaj aŭ
ripetataj anoncoj rabato.


Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finigonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abono povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.50 svis. fk., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 3½/2 pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 4 germ. mk. (por balaj kaj balkanaj ŝtatoj), 2 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., 50 pol. mk., 70 aŭstr. kr.; internacie 1 respond-kupono.

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 8 numeroj. — Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj — vidu sur paĝo 41 — Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoŝtalo (kvaronjare 48 mk.); senpera alsendo sub banderolo — kostas kvaronjare 65 mk.

Numero 89 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 18. Junio 1922.

Bad Reichenhall en la Bavara Alpoj.



Bad Reichenhall vidata de sudo.

Apud la limo german-aŭstria, en la sudorienta angulo de l' germana imperio, mallongan fervojeveturadon de Salzburg, situas ĉarmega ban- kaj refreŝig-kuracloko, al kiu ĉiu resopiras, kiu iam ajn pasigis tie kelkan tempon.

Bad Reichenhall, 470 m. super marnivelo, havas ion trege simpatian. Eĉ la superaj, rokaĵaj „sinjoroj“ grupiĝantaj sur tri flankoj ĉirkaŭ la vasta valo de la Saalach tute ne aspektas tiel seriozaj kaj minacaj, kiel tio estas en multaj aliaj montaraĵoj regionoj, sed ili ŝajnas intime harmonii kun la gaja kaj kerna raseto de la tieaj homoj. Jen la nobleformaj „Staufsen“-montoj (Hochstauffen kaj Zwiesel), Müllnerhorn, Lattengebirge kaj la legendoriĉa, marmorliveranta „Untersberg“, en kies interno la Imperiestro Karlo la Granda dormante atendas je siaj gloriĝaj taskoj, kaj kie dumnokte mira, fantoma popoleto pigmea ĉirkaŭvarmas kaj tremetigas la solecan migranton. Tiel rakontas almenaŭ la montaranoj, kaj kelkiu ruza maljunulo scias rakonti palpebrumante la plej strangajn kaj preskaŭ verajn detalojn. Sed la regiono de Bad Reichenhall ne tre taŭgas por fantomumado, ĝi tute ne havas ion melanholian, ermitecan kontraste: ĝi superfluas de floranta vivo, de saneca forto.

Kaj jam tial Bad Reichenhall havas tian magnan forton je la laca urbegano, kiu bezonas refreŝigon, unuavice aeron liberan de ĉiuj venenaj miasmoj, arbaran kvietecon, ĉarmajn pejzaĝbildojn kaj agrablajn, serenajn homajn ĉirkaŭon. Cion ĉi li trovas en Bad Reichenhall! Kaj se eble ankaŭ turmentas lin iu malsano aŭ malsaneto, ekz. reŭmatismo, la salfontoj certe havigos al li helpon de liaj suferoj.

Ĝuste tiuj ĉi salfontoj estas ja, al kiuj la Reichenhall'aj regiono dankas sian mondfamon, eĉ jam je la roma kaj ankoraŭ pli frua antikva tempo. Jam en la 7-a jarcento Bad Reichenhall ludis kiel salurbo gravegan rolon. La transporto de la Reichenhall'a salo tra Bavarujo estis la kaŭzo de la fondo de München. La ambaŭ plej fortaj salfontoj enhavas 24 kaj 25 procentojn da salo (markvo havas nur 3%) kaj estas la plej fortaj sur la kontinento. Ili liveras, krom la bezonoj por kuracaj celoj, ĉiutage preskaŭ 150 000 litrojn, t.e. 7500 kilogramojn da salo. Sed ne nur pro la

salfarado, ankaŭ por sanigaj banoj la fontoj ĝuis jam en la pratempoj tutmondan famon. Kie oni iam plej primitive banis, tie troviĝas nun ampleksaj aranĝaĵoj de komforta, moduma banejo, polare vizitata de pli ol 20 000 bangastoj, krom ankoraŭ pli alta nombro da pasantoj.

La centro de la bansezona vivado estas la ŝtata Kurparko, en kies vasta areo, havanta belegajn promenadovojojn, troviĝas la „Gradierhaus“, la salakva fontano kaj la promenadhalo kun ejo por trinki la sanigajn akvojn. De la supro de l' „Gradierhaus“ malsuprenĝuetas super branĉetoj potage 400 000 litroj da salakvo, pro kio la aero tie ĉi estas saturata de la tiamaniere disnebuligita salakvo.

Specialan intereson kaŭzas la bonegaj, sanitaraj aranĝaĵoj de la diversaj pneŭmatikaj ĉeloj laŭ plej novaj sistemoj, pleie la salfonto, kie, profunde subtere (72 ŝtupoj!) troviĝas 48 salfontoj. La salakvo estas plejparte pumpata sur la „Gra-

dierhaus“, kaj de tie ĝi fluas al la salfontano en la Kurparko.

Krom la salfontoj Bad Reichenhall havas ĉiujn kuracilojn indikatajn, interalie ĉiujn inhalistemojn por inspirado de montar-abiaj vaporoj, Ilgnosulfro, oksigeno, radiogeno, komprimata aero kaj ĉiuj speciaj kuraciloj por samtempa uzado por 600 personoj.

La salakvo-banoj estas indikataj kontraŭ skrofolo, virinseksaj malsanoj, reŭmatismo, artritio, raĥitio, neŭrozo, paralizo kaj kelkaj haŭtmalsanoj. Banoj el montar-pinia ekstrakto, marĉaj kaj fango-banoj, (por kormalsanuloj karbonacid-banoj), ĉi-speciaj elektrolum-, oksigen-, aerperil-, ozet- kaj radio-banoj kompletigas la sanigilaron, krome ankoraŭ naĝ- kaj sun-banoj.

Sed la plej potenca kunulo en la batalado kontraŭ la suferoj de l' spirorganoj kaj kontraŭ malstreĉigo estas la mirinde pura, milda aero de la tre ŝirmata valo, kies klimato (meza somer-temperaturo de 19 gradoj) evitas ĉiujn ekstremejn.

Multegaj ĉarmaj ekskursoceloj ellogas en la pli-malpli proksiman ĉirkaŭaĵon. 250 kilometroj da bone flegataj promenadovojoj, ebenaj kaj malrapide montantaj, trarkucas la tutan ĉirkaŭaĵon en densa reto. Kiu ŝatas malgrandajn, ne tre penigajn monteksursojn, trovas ilin sufiĉe en la „Stauffen“-montaro kun belegaj punktoj. Sed kiun incitas nur pli mallacilaj ekskursoj, tiu povas elprovi siajn fortojn sur kelkiu kruta pinto en la regiono de l' „Siona Maro“, Watzmann kaj la apudaj montaroj. Ankaŭ la belega Salzburg, Berchtesgaden kun Königsee (Reĝa Lago) kaj ankaŭ la Chiemsee estu citataj.

Pro sia milda klimato Bad Reichenhall estas ankaŭ vintra kuracloko. Ĉiuj porkuracaj aranĝaĵoj estas ankaŭ tiam uzablaj.

Krome Reichenhall estas vintra sportejo, ĝi havas grandan sportludplacon, skikursojn kaj -terenojn, glitvetur- kaj Bobsleigh-vojojn, glitkur-ejon ktp. ktp.

„Last not least“ estu citate, ke en la bela Bad Reichenhall ankaŭ ne mankas vigla Esperanto-Grupo, kunvenanta dufoje po semajno, kie niaj fremdaj gesamideanoj estas ĝojplene akceptataj kaj kie ili jam en la komenco de sia ĉi-tlea restado irovos ejon de nia „granda rondo familia“. La Bad Reichenhall'aj gesamideanoj faras sian ebilon por agrabligi la restadon de siaj Esperantistaj bangastoj. Ĝiudimante la grupo aranĝas komunajn ekskursojn en la ĉarmajn ĉirkaŭaĵojn. Kiu el niaj gesamideanoj-bangastoj iam estis en Bad Reichenhall, tiu resopiras je ĝi. Plej rekomendeblinde estas por la Esperantistaj vizitantoj, veni Reichenhall'on ekster la plej urĝa ĉefsezono (t.e. en julio kaj aŭgusto), ili venu dum aprilo ĝis junio aŭ septembro ĝis novembro, ĉar tiam neniam estas manko je ĉambroj kaj tiam ankaŭ la bona vetero estas regule plej konstanta.

Esperantolingvan prospekton kaj ĉiujn petatajn informojn donos la delegito de UEA, s-o Friz Mayerhauser. (Por leteraj informoj bonvolu aldoni la resp.-poŝtmarkon.)

Do, karaj gesamideanoj ĉiulandaj, pasigu vian libertempon en la belega Bad Reichenhall, vi neniam pentos!!

Ŝerceto.

Rakonto de A. Ĉehov.

Klara, vintra tagmezo. La frosto estas forta, ĝi krakas, kaj ĉe Nanjo, kiu tenas min sub la brako, kovriĝas per argenta prujno la bukloj sur la temploj kaj la lanugeto sur la supra lipo. Ni staras sur alta monto. De niaj plejdoj ĝis la tero mem etendiĝas dekliva ebenaĵo, en kiun rigardas la suno, kvazaŭ en spegulo. Apud ni staras glitveturileto, tegita per helruĝa drapo.

„Ni glitveturu malsupren, Nadejda Petrovna!“ mi petegas. „Nur unu fojon! Mi certigas vin, ke ni restos tutaj kaj sendifektaj.“

Sed Nanjo timas. La tuta spaco de ŝiaj malgrandaj galoŝoj ĝis la fino de glaciŝtato ŝajnas al ŝi teruriga, nemezureble profunda abismo. Kvazaŭmorta ŝia spirito kaj interrompiĝas la spirado, kiam ŝi rigardas malsupren, kiam mi nur proponas sidiĝi en la glitveturileton, sed kio estos, se ŝi riskos malsuprenflugi en la abismon. Ŝi mortas, frenezigos.

„Mi petegas vin!“ diras mi. „Oni ne timu! Komprenu, ke tio estas malkuraĝo, timemo!“

Nanjo fine cedas kaj laŭ ŝia vizaĝo mi vidas, ke ŝi cedas kun danĝero por la vivo. Mi sidiĝas ŝin, palan, tremantan, en la veturileton, ĉirkaŭprenas per la mano kaj kune kun ŝi min jetas en la senfundajn.

La glitveturileto flugas, kiel kuglo. La disbranĉata aero batas en la vizaĝon, kriegas, fajfas en la orelojn, ŝiras, dolorige piĉnas pro kolerio: volas deŝiri la kapon de la ŝultroj. Pro la premo de l' vento mankas fortoj por la spirado. Ŝajnas, ke la diablo mem ĉirkaŭbrakis nin per siaj manegoj kaj kun krio trenas nin en la inferon. La ĉirkaŭaj objektoj kunmiksiĝas en unu longan,

rapidege kurantan strion. . . Jen, jen ankoraŭ momento kaj ŝajne — ni pereos.

„Mi amas vin, Nanjo!“ diras mi duonvoĉe.

La glitveturileto komencas kuri pli kaj pli malrapide, la kriego de l' vento kaj la zumado de la gliitiloj ne estas jam tiel teruriga, la spirado ĉesas kvazaŭaŭmorte, kaj ni estas fine malsupre. Nanjo estas duonviva, duonmorta. Ŝi estas pala, apenaŭ spiras. . . Mi helpas al ŝi leviĝi.

„Neniam mi duafoje veturos!“ diras ŝi, rigardante min per grandaj simplenaj okuloj. „Por nenio en la mondo! Mi preskaŭ mortis!“

Post mallonga tempo ŝi rekonsciigis kaj jam demandeme ekrigardas miajn okulojn: ĉu mi diris tiujn kvar vortojn aŭ ili nur ŝajnaŭdiĝis al ŝi en la bruo de la ventego? Sed mi staras apud ŝi, fumas kaj atente rigardas mian ganton.

Ŝi prenas min sub la brako kaj ni longe promenar apud la monto. La enigmo, evidente, ne lasas ŝin trankvila. Ĉu estis diritaj tiuj vortoj aŭ ne? Jes aŭ ne? Tio estas demando de memamo, honoro, vivo, feliĉo, demando tre grava, la plej grava en la mondo. Nanjo malpacience, malgaje per penetranta rigardo enrigardas mian vizaĝon, respondas maltrafe, atendas ĝis mi ekparolos. Ho, kia ludo estas sur tiu ĉi aminda vizaĝo, kia ludo! Mi vidas, ke ŝi batalas kun si, ŝi volus ion diri, pri io demandi, sed ŝi ne trovas vortojn, al ŝi estas konfuzo, tiplene, malhelpas la ĝojo. . .

„Ĉu vi scias. . .?“ diras ŝi ne rigardante min.

„Kion?“ mi demandas.

„Ni duan fojon. . . veturu.“

Ni suprengrimpas la monton laŭ la ŝtuparo. Denove mi sidiĝas la palan, tremantan Nanjon en la glitveturileton, denove ni flugas en la terurigan abismon, denove kriegas la vento kaj zumas la

gliitiloj, kaj ĉe la plej forta kaj brua flugo de la glitveturileto mi diras duonvoĉe:

„Mi amas vin, Nanjo!“

Kiam la glitveturileto haltas, Nanjo jetas rigardon al la monto, sur kiu ni ĵus glitveturis, poste longe enrigardas mian vizaĝon, aŭskultas mian voĉon, egalaniman kaj senpasion kaj tuta, tuta, eĉ ŝia mufo kaj baŝliko, tuta ŝia figuro esprimas ekstreman miron. Kaj sur ŝia vizaĝo estas legebla: Kiel do estas io? Kiu diris tiujn vortojn? Li, aŭ nur ŝajnas al mi?

Tiu necerteco maltrankviligas ŝin, malpacience. La komatinda knabineto ne respondas miajn demandojn, malgajiga, estas preta esplori.

„Ĉu ni iru hejmen?“ demandas mi.

„Kaj al mi. . . plaĉas tiu glitveturado“, diras ŝi, ruĝiĝante. „Eble ni veturu trian fojon?“

Al ŝi „plaĉas“ tiu glitveturado, kaj tamen, sidigante en la glitveturileton ŝi, kiel dum la antaŭaj fojoj estas pala, apenaŭ spiras pro limo, tremas. Ni malsupreniĝas triafoje kaj mi vidas, ke ŝi rigardas mian vizaĝon, kontrolas miajn lipojn. Sed mi kaŝas la lipojn per poŝtuko, tusas kaj, kiam ni atingas la mezon de la monto, mi sukcesas eldiri:

„Mi amas vin, Nanjo!“

Kaj la enigmo restas enigmo! Nanjo silentas, pensas pri io. . . Mi akompanas ŝin de la glitveturejo hejmen, ŝi penas iri pli malrapide, malrapidiĝas la paŝojn kaj ĉiam atendas, ĉu mi diros al ŝi tiujn vortojn. Kaj mi vidas, ke suferas ŝia animo, ke ŝi ekregas sin, por ne diri:

Ne povas esti, ke ilin diris la vento! Kaj mi ne volas, ke tion diru la vento!

La sekvintan matenon mi ricevas letereton:

„Se vi iros hodiaŭ glitveturejon, venu, por kunpreni min. N.“

Kaj de tiu tago mi kun Nanjo komencas ĉiutage iri glitveturejon kaj, deflugante malsupren sur la glitveturileto mi ĉiufoje elparolas la samajn vortojn:

„Mi amas vin, Nanjo!“

Baldaŭ Nanjo kutimiĝas al tiu frazo, kiel al vino aŭ morfino. Ŝi eĉ ne povas vivi sen ĝi. Vere, flugi de la monto estas eĉ nun timige, sed jam la timo kaj danĝero aligas specialan ĉarmon al la vorto. pri la amo, al vortoj, kiuj ankoraŭ prezentas enigmon kaj turmentas la animon. Suspektata estas ĉiam la samaj du: mi kaj la vento. . . Kiu el ili deklaras al ŝi la amon, ŝi ne scias, sed tio ŝajne al ŝi jam estas tute negrava; el kiu vazo oni trinkas, estas sen intereso, se nur oni povas ebruliĝi.

Foje tagmeze mi ekiris sola glitveturejon; kunmiksiĝinte kun la amaso mi vidas, ke al la monto airas Nanjo, ke ŝi serĉas min. . . Poste ŝi timeme supreniras laŭ la ŝtupareto. . . Timige estas sole veturi, ho, kiel timige: ŝi estas pala, kiel la neĝo, tremas; ŝi iras kvazaŭ al la mortpuno, sed iras, iras ne rigardante, senhezite. Ŝi evidente decidis fine esplori, „ĉu estos aŭdeblaj tiuj mirindaj, dolĉaj vortoj, kiam li forestas?“ Mi vidas, ke ŝi, pala, kun malfermita pro timo buŝo, sidigas en la glitveturileton, fermas la okulojn kaj adiaŭinte por eterne la teron, ekmoviĝas. . . Jijij! zumas la gliitiloj. Ĉu Nanjo aŭdas tiujn vortojn, mi ne scias. . . Mi vidas nur, ke ŝi leviĝas el la glitveturilo afekcia, malforta. Kaj estas videble laŭ ŝia vizaĝo, ke ŝi mem ne scias, ĉu ŝi aŭdis ion aŭ ne. La timo, dum ŝi malsupreniĝis, malkapabligis ŝin ion aŭdi, diferencigi la sonojn, kompreni.

Sed jen venas la printempa monato marto. La suno fariĝas pli afabla. Nia glacia monto

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto kaj

VIII-a Kongreso de Universala Esp. Asocio

en Helsinko-Helsingfors, Finnlando
8.-16. aŭgusto 1922.

Natŭa Komunikilo.
(Flino.)

5. *Mendojn de la ŝipokoj* akceptas: En Britlando s-o H. Moy Thomas, adreso supre, solprezentanto. Mendo okazanta tiel frue, ke li povas ĝin transdoni al la reprezentanto de la ŝipkompanio en Hull ses semajnojn antaŭ la ekveturo. La alvetura prezo pagota ĉe anonciĝo. *Lübbeck*, s-o H. Selmer, Falkenwiese 11. Detalojn demandu rekte de li.

6. *Reveturajn biletojn* por ĉiuj linioj kaj tempo, ekster la Lübecka kaj brita zorgas L. K. K. Mendo elvenonta ses semajnojn antaŭ reveturo, kun pago almenaŭ paria.

7. *Pri la lokoj.* La kajutoj de I. kaj II. klaso estas por 2-6 personoj. Geedzoj volu frue mendi la malgrandajn kajutojn. En III. klaso estas tre multaj litoj en granda ŝipkelo; la kongresanoj estas tamen speciale rajtigataj tage restadi sur ĉiuj ferdekoj kaj en ĉiuj salonoj de la ŝipo. — Se la Lübecka ŝipo servos kiel hotelo, ĝi estos tre proksime al la kongresejoj.

8. *Karavano el Danzig.* Laŭ novaĵoj en Esperanto-Praktiko la Danzigaj samideanoj penas aranĝi karavanon per speciala ŝipo. La prezo estas anoncita je 2000 gmk. (?) — Al ni ŝajnas esti plej laŭcela koncentrigi ĉiujn fortojn al Lübecka karavano, por ke ĝi bone sukcesu.

9. *Postkongresoj.* Tallinn. La klubo „Espero“ en Tallinn aranĝos uniatagan postkongreson. La kotizo estas fiksita je emk. 50.—. Detalojn oni informos poste. Samtempe sciigas la „Espero“, ke la vojaĝo al Ruslando estas farebla tra Tallinn.

10. *Pölicanoj.* Kelkaj dekoj de Helsingforsaj policanoj lernas Esperanton.

11. *Al eldonistoj.* La solrajton pri vendo de literaturaj kaj paperajloj en la kongresejo havas OY. Movado AB. Bonvolu vian turni al ĝi je la adreso Kasarmink. 20, Helsinko.

12. *Fakaj kunaidoj.* Vegetaranoj, aranĝanto Finnlanda Vegetara Ligo, adreso ĉe L. K. K. Sciencistoj kaj kuracistoj, med. kand. Lauri Lappi, adreso ĉe L. K. K. Filatelistoj, Finnlanda Filatelistoj Ligo, sin turni al Lauri Laiho, Pietarinkatu 8. D. 29, Helsinko. Abstinenculoj, Ligo por alkoholmalpe. meso, 500 000 anoj, adreso Kfietotalillitto, Helsinko. Studentoj, Studenta Esperantista Societo, adreso med. kand. Lauri Lappi ĉe L. K. K. Liberpensuloj, Adolf Nurmi, Töölön Sokeri-tehdas, Helsinko. Poŝtistoj, Olli Launis, Laivurinkatu 41, Helsinko. Fervojistoj, H. Salokannel, adreso, Stacio Laihia. Krom tio estas planataj fakaj kunaidoj por instruistoj, katolikoj, inĝenieroj, komercistoj, stenografiistoj kaj ĵurnalistoj. Aranĝantoj ni informos poste.

malheligis, perdas sian brilon kaj fine degelas. Ni ĉesas glitveturi. La kompatinda Nanjo nenie plu povas aŭdi tiujn vortojn; cetere ilin neniu povas diri, ĉar la vento jam estas neaŭdebla kaj mi estas veturanta Peterburgon por longa tempo, kredible por ĉiam.

Foje, du tagojn antaŭ la forveturo, dum la krepusko mi sidas en ĝardeneto; de la korto, kie loĝas Nanjo, tiu ĝardeneto estas apartigita per alta barilo el tabuloj... Estas sufiĉe malvarme, en teraj sulkoj estas ankoraŭ neĝo, la arboj estas nudaj, sed jam sentiĝas la printempo kaj sin preparante por la noktodormo brue krias la frugilegoj. Mi aŭdas la barilon kaj longe rigardas tra fenodo. Mi vidas, ke Nanjo eliras sur la peroneton kaj direktas malĝojan, sopirantan rigardon al la ĉielo... La printempa vento blovas al si rekte en la palan, malĝalan vizaĝon... Ĝi rememorigas al si tiun venton, kiu kriegis al ni tiam sur la monto, kiam ŝi aŭdis tiujn kvar vortojn, kaj ŝia vizaĝo fariĝas malĝala, malĝala, de la vango ruliĝas larvo... Kaj la malfeliĉa knabino etendas ambaŭ manojn, kvazaŭ petante la venton denove diri tiujn vortojn. Kaj mi, atendinte ekblovon de la vento, diras duonvoĉe:

„Mi amas vin, Nanjo!“
Dio, kio fariĝas kun Nanjo! Ŝi ekcrias, ekridetas plenvizaĝe kaj etendas renkonte al la vento la manojn. Klom bela ŝi estis en sia ĝojo!
Kaj mi iras prepari min por la forveturo.
Tio estis jam delonge. Nun Nanjo jam estas edzino: oni edziniĝis ŝin aŭ ŝi mem edziniĝis — estas tute negrave — je la sekretario de Nobela Helpkomitato, kaj nun ŝi jam havas tri infanojn. Ke iam ni kune iris glitveturejon, kaj ke la vento alportadis al ŝi la vortojn „mi amas vin, Nanjo“, pri tio ŝi ne forgesis; por ŝi tio estas nun la plej

13. *Banlokoj en Finnlando.*

Ĉar kelkaj kongresanoj demandis pri banlokoj de Finnlando, ni jene donas mallongan informon pri kelkaj pli gravaj. Laŭ deziro ni volonte sendos pli detalajn sciigojn pri iu speciala banloko.

Hanko (Hångö), sur marbordo de Finna Golfo. Ĉiuj modernaj kurac-kaj banmetodoj uzataj. Specialaĵoj: basenoj kun konstante trafluanta varmigita marakvo. Naŭheima karbondioksida bano, ŝlimmasaĝo, elektrokuracado. Precipe konvena por kormalsano, neŭrastenio, arterioskleroso, diabeto, ren-kaj virinaj malsanoj ktp. Tuberkulozulojn oni ne akceptas. Bonega „Casino“, okazo por ĉiusepa amuzo. La societvivo nedeviga.

Naantali (Nädendal), bela, antikva urbet, ŝirmata de bela marinsularo. Ĉiuj modernaj banmetodoj. Specialaĵoj: Nädendala ŝlimmasaĝa kaj pinena bano. Konvena por reŭmatismo, neŭrastenio, kor-kaj virinaj malsanoj ktp. Dimanĉe muziko. Bela bordopromenado.

Lovisa, sur marbordo de Finna Golfo. La vivo en la urbo modesta, ne tro ŝarĝita per amuzadoj. Specialaĵoj: radioaktiva fontakvo. Konvena por reŭmatismo, kor-, ren-kaj virinaj malsanoj ktp. Muziko ĉiutage. Infektaj malsanuloj ne akceptataj.

Savonlinna (Nyslott). Urbo kun antikva kastelo inter belegaj lagoj. En proksimeco i. a. la fama turistloko Punkaharju. Oni uzas ĉiujn modernajn kurac-metodojn. Okazo al boat-kaj ŝipetvojaĝoj sur la insulriĉaj lagoj.

Heinola, belega, enlanda banloko, ĉiuj modernaj metodoj uzataj. Malgranda urbet en vere ĉarma lagregiono. Klimato kaj grundo tre favoraj.

Ruusi, fernehava fontakvo. Multe vizitata banloko en kamparo, en belega enlanda lagregiono.

Prezoj: Kuracista honorario, laŭ daŭro de la kuracado, por la tuta somero ĉ. 150 fmk. — Banpagoj dependas de la nombro kaj eco de banoj, por semajno 18—90 fmk. Pago por masaĝo 60 fmk. por semajno. S. zonpago: bangastoj 10—25 por semajno, ne-enkribitaj gastoj 25—40 fmk. por semajno. Loĝejo: 400—2000 fmk. por la tuta sezono. Manĝo: 125—200 fmk. semajne. Sezono: de la unuaj tagoj de junio ĝis la lastaj de aŭgusto.

Novaj aliĝoj. La aliĝintoj registritaj ĝis la redakcio de la 9-a komuniko estas el sekvantaj landoj:

Estonio 46, Germanio 42, Britlando 41, Pollando 31, Nederlando 17, Ĉeĥoslovakio 17, Aŭstrio 16, Francio 12, Hungario 7, Italio 6, Litovio kaj Belgio po 4, Danlando, Latvio, Svislando po 3, Rumanio, Svedlando, Aŭstralio po 2, Norvegio, Jugoslavio, Hispanio, Turkio, Usono, Kanado, Japanlando, Venezuelo, Urugvajo po 1, Finnlando 145, entute 412 aliĝintoj el 28 landoj.

(La tuta nombro de la aliĝintoj la 31-an de majo estas 636.)

15. *Helpokongresanoj* aliĝis 40.
16. *Garantia kapitalo:* La L. K. K. danke notas la jenajn garantiantojn: S-o A. Salokannel, Punkaharju, 500.— fmk. S-o E. de Wolf jr., Haarlem, 500.— fmk. Sumo 800.— fmk., antaŭa sumo 15000.— fmk., entute 16300.— fmk.

17. *Donacoj* ricevitaj de L. K. K. 1349,71, antaŭa sumo 69666,08, entute fmk. 71015,79.

18. *Blindula kaso.* La L. K. K. danke notas la donacojn por la eldona kaso de la blindaj Esperantistoj: 410,23 fmk., antaŭa sumo 660,14 fmk., entute 1070,97 fmk.

19. *Atento!* Ĉiuj aliĝintoj kaj aliĝantoj estas petataj kiel eble plej baldaŭ informi la L. K. K. pri 1. la dato kaj linio de alveno, 2. deziroj pri loĝigo kaj ekskursoj kaj 3. pri partopreno en fakaj kunaidoj.

La Loka Kongresa Komitato.
Adreso: Poŝta (ankaŭ por mensendoj): XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinko, Finnlando.
Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

feliĉa, plej kortuŝanta kaj bela rememoro de la vivo...
Kaj mi, intertempe fariĝinte pli maljuna, jam ne komprenas, kiel mi diradis tiujn vortojn, pro kio mi ŝercis...

El rusa lingvo tradukis J. Shapiro.

Korektoj.

F-ino Helmi Dreyen en Tallinn petas nin sciigi, ke en la Natŭa Komunikilo de la LKK de la XIV-a sub 3. „Novaj Vojoj“ erare estas notite, ke la prezo por ŝipiro Tallinn-Helsinki aŭ nur reveno estas 800 emk.; la efektiva prezo estas 80 fmk. En la raporto pri Sudgerm. Esp. Kongreso (ET n-o 86) la protokollinto erare skribis, ke Innsbruck ne estis reprezentata; fakte Innsbruck estis jes reprezentata.

En n-o 87, sub „Mallongaj Esp. Sciigoj“, estas korektite, ke la nomo de la Esp. blindulo en Genova estas Josefo Garino, kaj ke „David Chiassone“ estas la nomo de la Instituto.

La germanaj Poŝtabonantoj de ET

bonvolu renovigi sian abonon por la venonta kvaronjaro kiel eble plej baldaŭ. Ĉiu prokrasto post 25. junio kaŭzos al vi ĉagrenon pro interrompo en la regula ricevado de ET kaj al ni necesas laboron kaj perdon de tempo, kiujn ni povos pli bone uzi por la plibonigo de la ĵurnalo.

Internacia Antaŭkongreso en Libera Urbo Danzig.

Dua Komunikilo.

Dato. La kongreso okazos la 4-an ĝis 6-an de aŭgusto. La ŝipo kun la kongresanoj el Lübeck alvenos la 6-an tagmeze en la haveno de Neufahrwasser.

Honora Komitato formiĝis. Ĝia prezidanto estas la prezidanto de l' Senato de Libera Urbo Danzig, s-o Sahn.

Pri pasportoj ni klopodas ricevi plifaciligatojn de la germana kaj pola registaroj. La rezultatojn atingotajn ni ĝustatempe komunikos en Esperanto Triumfonta.

La prezoj pri veturo, loĝado kaj manĝado de tago al tago aliĝas. Nun la veturo al Helsinki kaj reen inkluzive manĝado kaj loĝado surŝipa dum la kongreso en Helsinki kostas 6500 gmk., loĝado kaj manĝado en Danzig 200—400 gmk.utage.

Aliĝilojn ni presigis kaj disdonigis. Kotizaĵo: Usono 1 dol., Nederlando 2 hfl., Svisujo 5 sfk., Danujo-Norvegujo-Svedujo 5 kr., Italujo 5 lir., Britujo 5 ŝil., Hispanujo 5 pes., Francujo kaj Belgujo 15 fk., Finnlando kaj Ĉeĥoslovakujo 15 fmk. aŭ kc., Germanujo kaj Danzig 30 gmk., Rumanujo 30 lej, Bulgardo 40 lev., Jugosl. 50 kr., Aŭstrujo kaj Hungarlando 100 kr., Polujo 300 pmk., aliaj landoj 30 gmk. laŭkurzaj en nacia mono.

Adresoj. Por mensendoj: Deutsche Bank, Filiale Danzig, Esperanto-Kongreso-Konto Werner Hoffmann. Bankbiletojn sendu nur rekomendite! Poŝtekkonto de l' banko n-o 66 ĉe Postscheckamt Danzig.

Por ĉiuj aliaj sendaĵoj: Esperanto-Werbeam, Danzig, Kaserne Herrengarten. Demandante oni ĉiam aldonu valorajn respondekuponon aŭ bankbiletojn ne ĉifonitajn.

Oficiala programo.

1-a tago. Danzig: 9—11 h. Gvidado tra la urbo, poste vizitado kaj rigardado de la famekonata urbdomo kaj Ariushof (borsio). 1 h. Komuna tagmanĝo. 4 h. Koncerto en parko de pafista domego (Schützenhaus), same ankaŭ en St. Marien 8 h. Publika manifestacio. Prezntadoj de profesiaj aktoroj, kvarvoĉaj virkantadoj en Esperanto.

2-a tago. Zoppot. 8 h. Forveturo al Oliva. Tie vizito de antikva moneĥejo, preĝejo — ludado de la famekonata grandega organo — kaj ĝardenego, promenado tra la belegaj arbaroj al Karlsberg kaj ĝuo de belrigardo al la ĉarmega marborda regiono. 10 h. Promenado aŭ veturo al Zoppot. Tie je 1 h. komuna tagmanĝo (Stolzenfels). 4 h. Vizito de la mondkonata marbanloko Zoppot kaj ĝuo de la marborda vivo. 8 h. Partopreno je festo, poste dancado (festbalo).

3-a tago. Neufahrwasser. Antaŭtagmeze diservo por protestantoj kaj katolikoj kun Esperantaj predikoj. 12 h. Komuna tagmanĝo, poste forveturo al Neufahrwasser kaj adiaĝo por la veturontoj al Helsinko. La restantaj gastoj povas partopreni je marbordaj amuzadoj.

Danzig, komence de junio 1922.

Loka Kongresa Komitato.

La Franca Kunveno.

La jara kunveno de la S. F. P. E. kaj de francaj Esp. grupoj okazis en Paris la 3. kaj 4. junio en la urbdomo de la V-a distrikto. Kvankam improviziata, ĝi kunvenigis 70 personojn el Paris kaj la provinco, kiuj utile laboris dum du tagoj, diskutante diversajn demandojn de la Esp. movado en Francujo. La morala kaj financa raporto estis unuvoĉe aprobatata. Estis voĉdonata, post parolado de prof. Decourt, deziresprimo, ke la S. F. P. E. estu organizata el izolitaj membroj, grupoj kaj regionalaj federacioj. Laŭ alia deziresprimo, la bulfeno de la S. F. P. E. enhavos nur oficialaĵojn kaj estos senpage aldonata al abonantoj de „France-Esperanto“, membroj de la Societo. Nova komitato estis elektata.

La 3-an vespere okazis bankedo en la universitata restorako kaj poste reprezentado de „La Kontraŭvola Kuracisto“ per „La Verda Kato“ en la urbdomo de la V-a distrikto. S-o urbestro Perottet, direktoro de la kolegio Ste. Barbe, ĉestis kaj faris favoran paroladon. Profesoroj Aymonier, Cart, Decourt kaj Grosjean-Maupin pritraktis mallonge la verkojn de Molière.

Dimanĉe posttagmeze kaj lunde okazis specialaj kunvenoj de UEA, katolikoj, junuloj kaj instruistoj, kaj ekzamenol. Komuna tagmanĝo kaj promenado en „Robinson“ finis la kunvenon.

Salutaj telegramoj estas senditaj al la angla, belga kaj germana kongresol.

I-a Tutpola Esperanto-Kongreso.

Laŭ „Dz'ennik Tczew-ki“ la kongreso sukcesis bone. Reprezentataj estis la prezidanto de Polujo per generalo Jacyna kaj la ministrio per aferol eksteraj per s-o Klimecki, kiu sciigis, ke la ministrio vigle interesiĝas kaj simpatias pri la projekto inviti internacian Esp. kongreson al Varsovio. I. a. la urbestro de la industri-urbo Lodz s-o Rzewski, ne povante mem ĉesiti, sendis saluttelegramon plenan da simpatiataj vortoj por nia afero. — Se eble, pli detala raporto sekvos en venonta numero.

Pri la Brita Esp. Kongreso

en London ni bedaŭrinde ne ricevis specialan raporton. Ni nur povas mallonge resumi, kiun ni legis en „Westminster Gazette“ de 5 junio, pri la Publika Kunveno, kiu okazis sabaton la 3. junio en Queen's Hall. Ĉestis ĉ. 500 delegitoj. Unue oni kantis Esp. tradukon de la brita nacia himno „God save the King, Di!“ Poste la prezidanto s-o Dr. D. W. Kimmins faris saluaparoladon.

La propagandan paroladon faris d-ro Edmond Privat, kiu parolis unue angle, poste Esperante. S-o F. Rickett Shelton, eldonanto de „The British Esperantist“, diris, ke en BEA estas organizitaj 1100—1200 senperaj membroj kaj 120 grupoj.

Dimanĉon vespere okazis demonstracio en Hyde-Parko, kie la ĉefan paroladon en Esperanto faris 7-jara knabino Myfanwy Mary Butler. Ŝi bone respondis al demando el la publiko, kaj s-o Yelland tradukis ŝiajn respondojn. La malgrandulino lernis legi Esperanton en la aĝo de tri jaroj.

Esp. Inter-Banaj-anoj.

Inter membroj de l' Germana Bana, Unuigo funkcias Esp. kurso (en Stuttgart) por estonta laborunuigo por Esperantistoj de la Sanktaj Skriboj de „La Plej supera Plumo“. La progata organo de la G.B.U. „Sono de la Vero“ (redaktorino s-ino konsulo Alice Schwarz-Solivo, Stuttgart, Alexanderstr. 3) depost marto 1921 regule enhavas kelkajn paĝojn en Esp. lingvo.

Aliaj apartaj Esp. kursoj funkcias en Stuttgart ĉe Unuigo „Constantia“ (katolika) kaj ĉe „Volksbildungs-Verein“ (popolkleriga unuigo).

Framasonio.

London.
Ĉe loĝio „Albert de Belgique“ (Granda Oriento de Belgujo) la 20. majo s-ino M. L. Blaise faris sukcesplenan paroladon pri „Esperanto kaj Frateco de Nacioj“. Ĉiuj ĉestantoj promesis baldaŭ lerni la lingvon. Privata kurso jam komenciĝis por kelkaj el ili. S-ino Blaise estis petata ripeti sian paroladon ĉe aliaj loĝioj kaj, se eble, organizi kursojn dum venonta vintro.

Genova (Italujo).
Esperanto enigas inter Liguria Framasonaro. Ĉe loĝio je simbola, antikva kaj aprobita Skota rito oni jam starigis Esp. kurson. Fremdaj kunfratoj korespondu laŭ adreso: S-o Lincoln Sacconi, loĝio Kultura Moderna, Galerio Mazzini 7—3, Genova.

Katolikaro.

Faka kunveno de la katolikaj Esperantistoj dum la XI-a Germana Esp.-Kongreso en Breslau.

Komence de la de s-o Ekl. Konsilanto Becker (Breslau) gvidata kunveno oni konstatis, ke la katolikaj Esperantistoj havas la devon, en aparta organizaĵo kolekti anojn de Esperanto el la katolikaj rondo. Poste oni restarigis la malnovan Germanan Ligon de IKUE, kiu — restarigite post la milito — dum la konflikto de la pasinta jaro estis malaperinta. Kiel prez. oni elektis Ekl. Kons. Becker, vicprez. s-inon Elli Baumgart (Dresden), sekr. d-ron Hotzelt (Bamberg). Ĉiu ano mendas „Espero Katolika“, oni nur postulas laŭvolajn kotizaĵojn. Postkiam estis preparollata kelkaj deziresprimoj al la Sepa Katolika Esperanto-Kongreso en Nymegen (aŭgusto 1922), s-o Ekl. Kons. Becker fermis la bone sukcesintan kunvenon. Klarigojn donas la Landa Oficejo de IKUE, Bamberg-Strullendorf.

Komercio.

S-o Bankisto D-ro Anton Vogt, nia malnova pioniro (de 1903) en Germanlando, estinte preskaŭ 15 jarojn direktoro de grandbankoj de Berlin, nun establis bankelon en Stuttgart, la ĉefurbo de Würtemberg, sub la firmo „Dr. Vogt'sche Bank, Komandit-Societo“. D-ro Vogt, kiu estas samtempe ĉefdelegito de UEA por la ŝtato Würtemberg, disponas pri Esp. korespondantoj, tiel ke li povas bone plenumi komercajn aferojn de ĉiunacianoj. Ni atentigas speciale je la anonco de Bankejo Vogt en nia antaŭa kaj en sekvontaj numeroj.

Instituto por Plibonigo de Industrio, Komercio kaj Metioj en Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio. (Oficiala titolo „Ústav pro zvelebování živnosti“).

Estas tre grave atentigi eksterlandajn rondojn komercistajn kaj industristajn pri tiu ĉi Instituto, kiu tre bone povas utili al ĉiu, kiu interesiĝas pri eks- aŭ importoj ĉeĥoslovaka. — Jen kelkaj koncizaj vortoj pri la celoj de la Instituto kaj pri ĝia organizo:

La Instituto utilas al fabrikantaj rondoj per prizorgado de teknikaj bezonaĵoj, maŝinoj kaj helpiloj progande, per intertraktado pri liveroj al ŝtato kaj al gravaj korporacioj. Precipe la Instituto akcelas plibonigon de fabrikad-kondiĉoj kaj de fabrikad-procedol, zorgas pri havigado de krudmaterialoj kaj pri debito de fabrikadoj, estante pro tiaj celoj en konstanta rilato kun la komercaj ĉamroj kaj kun la ambasadorejoj.

La Instituto havas specialan fakon por hejmeca industrio, en kiu ĝi ĉelas per plivalorigo de fabrikadoj kaj per ekonomia subteno iniciali kreon de ekspordiaj kooperativoj. — En orienta Bohemio ekzistas ekzemple forta industrio punta kaj ludila,

kiu grave partoprenas de la monda merkato, kie ĝi per helpo de la Instituto akiris fidindajn reprezentantojn. — En la tuta mondo famkonis tiu ĉia viro-industrio trovas en la Instituto sciantian helpanton komercan kaj konsilanton teknikan. Fine inter la taskoj de la Instituto apartenas aranĝado de diversaj fakaj kursoj por ĉiuj branĉoj industriaj kaj metiaj, fondigo de fakaj lernejoj, poste de la ŝtato regule transprenataj.

En la Instituto koncentriĝas ĉiuj specialaj industrioj, metioj kaj komerco. — La Instituton estras direktoro kun referentoj fakaj pri diversaj branĉoj industriaj kaj komercaj. Ĉia laboro estas farata senpage, kaj la ŝtato kaj la komercaj ĉambroj estas la solaj vivtenantoj de la Instituto, kiu nature ankaŭ estas sub ilia konstanta inspekto.

Ĉe la Instituto funkcias kooperativo por aĉetado de maŝinoj, kiu por ne sufiĉe riĉaj entreprenistoj aĉetas kaj konstante pagas la necesajn maŝinojn, kiuj aparte estas repagataj.

Ĉe la Komerca Ĉambro en Hradec Králové estas fondita Esperanto-fako, kiu same funkcias ankaŭ por la nomita Instituto, kaj mi varme rekomendas al ĉiu eksterlanda komercisto kaj industriisto, kiu intencas trovi debiton por siaj fabrikoj kaj komercoj, ke li kun fido turnu sin al niaj institucioj, alsendante siajn katalogojn, prezarojn, ofertojn, pri kiuj ĉiusemajne raportos la Komerca Ĉambro en ĉiuj gazetoj, kiuj estas je ĝia dispozo. — Komercistoj, kiuj serĉas en Ĉeĥoslovakio novajn aĉet-fontojn, ankaŭ turnu sin kun fido al la institucioj, kiuj donas fidindajn, precizajn informojn senpage.

Kolegojn delegitojn de UEA mi varme petas, ke ili afable uzu tiujn ĉi nian informon por utilo al nia poresperanta laboro. —

Sufiĉas jena adreso: „Komerca Ĉambro, Esperanto-fako, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio“.

O. Sklenčka, delegito de UEA.

Skoltismo kaj Esperanto.

La Unua Brazilia Skolta Kongreso ĵus aprobis, per aplaudi, la jenan deziresprimon prezentitan de s-oj Guilherme Azambuja Neves kaj ing. A. Couto Fernandes:

„Konsiderante, ke pli kaj pli montriĝas la neceso de internacia lingvo por la skoltoj; konsiderante, ke Esperanto tute plenumas la postulojn de lingvo internacia; la Unua Brazilia Skolta Kongreso decidas konsili, ke ĉiuj skoltoj lernu Esperanton kaj ĉiuj grupoj faciligu la lernadon de tiu lingvo, malfarmante kursojn en sia sidejo.“

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Hispanlando.

En Jerez de la Frontera okazis bone sukcesinta Esp. ekspozicio kun propagandaj paroladoj de s-oj Gerson Ruiz el S. Fernando kaj Naranjo Teran. Ĉiuj lokaj ĵurnaloj raportis pri ĝi. En Tarrasa finiĝis en majo kursoj kun pli ol 70 p.

Pri Esp. movado en Zürich (Svisl.)

ni ricevis bonan kaj detalan raporton, kiun ni plene publikigis, se la loko tion permesus. Mallonge ni resumas:

La laboro de la Zürich'aj samideanoj estas tre malfacila, ĉar Z. estas centro de la idomovado en Svislando. Tamen la societo sukcesis dum 1921 okazigi 3 kursojn por komencantoj kaj unu por progresintoj. La nombro de la societanoj duobliĝis. Oni eldonis dumonatan hektografitan bulleton.

La 4. majo 1922 okazis publikaj paroladoj de prof. Dieterle kaj d-ro Steche reveturantaj de la Geneva Konferenco; samtempe ekspozicio. Ĉeestis ĉ. 150 personoj, ankaŭ idistoj, kiuj distingiĝis sin tiun ĉi fojon per aprobinda silentiado. Novan kurson kun 10 p. gvidas s-o R. Unger.

Artikolo pri Esperanto en gazeto de apud-Züricha distrikto Horgen rezultigis publikan paroladon la 2. majo kaj kurson. Grupo fondota.

La 18. majo parolado de s-o Jost al junaj komerciantoj, kaj ekspozicio.

Entute vigla societa vivo. Vizito de eksterlandaj gasteoj. Kunveno ĉiŝaŭde en „Karl der Grosse“

kaj la lastan jaŭdon de ĉiu monato en kafejo „Passage“.

Ĉefaj agantoj en Zürich estas s-oj Unger, Jost, prof. d-ro Müller kaj Hammer.

Italujo.

En Trieste baldaŭ finiĝos tri kursoj kun ĉ. 140 gelernantoj. Por ricevita interesa fotografajo ni dankas, sed bedaŭrinde ne povas publikigi ĝin.

Komisiono de Esp. Fervojista Unio en Torino

estis akceptata la 8. junio ĉe la direkcio de la ferojia „kompartimento“ de Torino. Ĝia estro, s-o kom. ing. Edilio Ehrenfreund, bone akceptis la proponojn prezentitajn kaj promesis personan interesigon por doni al Torino ferfojistoj, kiel antaŭ nelonge faris la ĝen. direktoro de la „Ferrovie dello Stato“ en Roma, lokon por biblioteko kaj kunveno, apud la centra stacidomo de Torino P. N. — Partoprenis en la komisiono s-o Kav. Saccani kiel reprezentanto de la Torino Esp. Asocio kaj la fervoj-oficistoj s-oj Ramollo, Bisetti, Bonino kaj Torchio.

Fiume-Budapest.

S-o Th. Kovacs gvidis en lastaj monatoj en Liberurbo Fiume tri kursojn kun 50 p. — La 14. majo ekskurso al Grohovo kaj Drenova, ĝen. kunsido en libera naturo kaj fondo de „Esp. Grupo Fiumana“ (prez. J. Sikić, vicprez. J. Koos, sekr. L. Gabelić, kc.). Nova UEA-del. s-ino Anna Maudie. Pro cirkonstancoj de la vivo s-o Kovacs devis forlasi Fiumon, kie li loĝis dum kvarona jarcento kaj laboris 15 jarojn por Esperanto, kaj iris Budapeston. Volonte li akceptos viziton de samideanoj. Adresd: Budapest, Pest-ujhely, Hatar ut 9.

Svedlando.

Dum unu semajno aperis 40 artikoloj kaj notoj pri Esperanto en svedaj ĵurnaloj. — Pri la konferenco de instruistoj en Genève raportis 15 ĉiutagaj ĵurnaloj.

Novaj grupoj en Jönköping kaj Tingsryd. La grupo de Mora nun havas 75 anojn, krom tio oni fondis grupon por infanoj kun ĉ. 30 anoj.

Aŭstrio.

Eksterordinara ĝen. kunveno de la grupo Salzburg okazis la 26. majo. Nova prezidanto s-o Grössinger, vicprez. prof. d-ro Christanell. Nova grup-adreso: Rich. Grössinger, Elisabethstr. 17. Kunveno gastejo „Blau Ansero“, Siegmundplatz (vendrede je 20 h.). Del. de UEA: Jos. Vogel, Wolfdierichstr. 15. Oni fondis subgrupon „Unueco“ en Saalfelden kaj laboristan grupon en Hallein.

Jara ĝeneralkunveno de Centra Dana Esperantista Ligo

okazis la 5. junio en Kopenhago. Laŭ la regularo estis prezentataj la labor-kaj kalkularportoj. Cetero la ĝen. kunveno decidis plilargi la kolizojn; sed la reprezentantaro havos la rajton malplilargi ĝin ĝis la duono por kluboj, kies membroj pagas malaltan kotizon.

La nomo de la agitadofondaĵo estos de nun „Fondaĵo de C. D. E. L.“ por aĉeto kaj eldono de propagandiloj.

S-o Blicher ekzistis kiel prezidanto, kaj anstataŭe estis elektata s-o ing. Taŭmose. La reprezentantaro nun konsistas el s-oj Taŭmose, Carlsen, Christensen (la du lastaj el Odense), Hinrichsen, Krejl, Wulff, d-ro Mejndor (el Aarhus) kaj el f-inoj Asmussen, Bjarnov, Jørgensen kaj Rybo. Pri loko kaj tempo de la venonta jarkunveno decidis la reprezentantaro.


Franclando.

Dank' al la laboro de s-o Dumas, licea eksp., kiu fondis grupon en Vaison, la urbestro kaj turisma societo eldonis ilustritan gvidlibron en Esperanto.

Esperantaj budoj ĉe folioj.

La 9.—16. junio okazis regiona foiro-ekspozicio en Orléans, kun Esp. budo, organizita de la loka grupo.

Dum la Internacia Folro de Bordeaux (15.—30. junio) Esp. budo estos organizita de la loka grupo.



Bad Reichenhall. — Grossmain.

Germanlando.

GEA nun konsistas el 170 grupoj. Nove aliĝis la grupoj en Falkenstein, Schwabach, Berlin-Friedrichshagen, Waldshut a. Reino, Welper i. W., Buer-Scholven, Osnabrück kaj Pirna.

Al cirkulero de GEA, sendita al la germanaj komercaj ĉambroj, respondis ĝis nun 16 komercaj ĉambroj, el ili 11 por, 3 kontraŭ kaj 2 neŭtrale.

En Hagen i. W. komenciĝis tri Esp. kursoj en popollernejoj por geknaboj de 12—14 jaroj; entute ĉ. 100 p. — Samtempe Esperanto estas instruata al 15 instruistoj kaj al 20 komercistoj de magazeno.

En Koblenz nova kurso komenciĝis la 7. junio. — Kurso projektata en najbara urbo Lahnstein. — La 11. junio fondiĝofesto de la grupo Koblenz kun propaganda parolado. — Adreso: Esp. Oficejo Koblenz, Löhrrstr. 90.

Nederlando.

S-ro Urho Sarajas, vic-konsulo de Finnlando el Rotterdam, faris Esperantan lumbildparoladon la 6. junio vespere en Hagoo.

Proksimume 70 ĝeaiŝkultantoj ĉeestis, inter kiuj ni rimarkis kelkajn alilandulojn. La parolanto rakontis multajn novaĵojn pri Finnlando, pri ĝia historio, lingva batalo, finnaj moroj kaj kulturo, sociaj kaj ŝtataj cirkonstancoj, religio, virtua kaj abstinenco movado, komerco kaj industrio, ktp. Sarajas, ke la bolŝevismo ne povis havi sukceson en Finnlando, ĉar ne ekzistas tiel grandaj kontrasto inter posedantaj kaj neposedantaj klasoj kiel en Rusujo. Depost 1917 Finnlando estas sendependa respubliko.

Per la lumbildoj ni pense alveturis al la urbo de nia XIV-a trans la trankvila Baltika maro kaj ĝuis la panoramon de la bela insularo kaj finnaj bordoj. Ni ne priskribos la 100 bildojn de Helsinki, de la sportemaj finnoj, de la belaj lagaroj kaj pinarbaroj; ni nur menciis, ke la montrado estis konsolo por tiuj holandaj samideanoj, kiuj ne povas partopreni en la venonta mondkongreso.

Certe ni ŝuldas sinceran dankon al s-o Sarajas, kiu montris sin taŭga reprezentanto de la energia finna registaro, kiu donis praktikan ekzemplon al aliaj, favore al la pacajn internaciajn popolrilatojn.

Belgujo.

En Antwerpen nova kurso kun 25 gelernantoj ĉe Grupo de Esp. Diamantistoj. — Kurso de s-o Schoofs ĉe YMCA. — 4 novaj kursoj kun entute 140 lernantoj komenciĝis la 2. kaj 4. majo ĉe „Verda Stelo“.

En Bruxelles funkclax kurso kun 15 p. ĉe Popola Domo.

En Gent diversaj paroladoj pri Esperanto. Novaj kursoj de s-oj Colyn kaj Somering komenciĝis la 8. majo.

En Liero komenciĝis kurso kun 40 p. la 7. majo.

En diversaj belgaj gazetoj favoraj artikoloj, precepte en la ĵurnaloj de Verviers.

La Nekroforoj.

En februaro ekaperis en Estonio folieto „Kosmoglotto“ kun pompa subtitolo: „ĵurnalo scienca senpartia de lingvo internacia, organo de l' societo Kosmoglotto“. Tiu subtitolo enhavas kvar malĝustojn. Unue, la folieto libroformata aperas nur monate, do ĝi ne estas ĵurnalo. Due, ĝi ne reprezentas ian ajn sciencon, nek la sciencisto kunlaboras en ĝi, do ĝi ne estas scienca. Tria, ĝi estas redaktata en lingvo „Okcidentala“, do ĝi ne estas senpartia. Kvare, ĝi ne estas organo de la societo Kosmoglotto, ĉar tiu societo nun fakte ne ekzistas pro la nenormalaj kondiĉoj en Petrogrado. Kaj du sinjoroj (estroj de la folieto), estintaj membroj de la petrograda societo, profiinte la morton kaj elmigranon de la societanoj el Petrogrado, uzurpe deklaris la societon transportita . . . en Reval kaj enkarnita en ili.

Rigardante la folieton eldonatan de la du sinjoroj, kiujn mi jam delonge konas, mi nevole rememoras, permesu al mi la sciencistoj la komparon pri unu speco de skaraboj, kiuj vivas kaj sin nutras en putriĝantaj kadavroj (— la nekroforoj!).

En la folieto — nenio propra je la aŭtoroj: ĉio pruntita el artingvarva arkivo kaj tombaro. Nenia nova ideo, nenia freŝa veneto, nur malnovaj pensoj, malnoviĝaj argumentoj, falsaj pruvoj. Plej kurioza estas cirkonstanco, ke la redaktoro, kiu sisteme

kritikas kaj kalumnias nian lingvon kaj ldon, ne konas ilin, nek sekvas ilian literaturon. Ekz. li asertas (n-o 3, p. 13), ke en Esperanto ekzistas vorto Budo, en senco de Sakjamuni, dum en nia literaturo ni uzas ĝin sub la formo Budha aŭ Budho, — ke en Esperanto ne ekzistas vorto skolo, kaj la vorto lernejo ne taŭgas por esprimi artan skolon, dum tiu vorto troviĝas en la D-a Oficiala Aldono, kaj iam delonge estas uzata en la literaturo. Polemikante kun ldistoj, la redaktoro sin bazas sur la unua lda vortaro (1908) kaj evidente ne scias, ke ldo evoluis ĉiujare ĝis 1914, kaj la ldistoj mem ne rekonas plu la ldon de 1908.

La societo Kosmoglotto, unu el kies fondintoj mi estis en 1916 en Petrogrado, havis la celon propagandi la ideon de lingvo internacia, sen prefero de tiu aŭ alla solvo, kaj doni al la publiko eblon konatiĝi kun la ĉefaj lingvoprojektoj. Laŭ la poraga regularo nur naciaj lingvoj estis uzablaj por la oficialaj eldonoj. Pro tio, slastempe, estinta komitato de l' societo neniam uzis — por oficialaj celoj — iun ajn artefaritan lingvon, nek laŭdis aŭ mallaŭdis la apartajn lingvoprojektojn.

Kiel unu trajton karakterizan por la nomitaj sinjoroj mi citas la frazojn de l' redaktoro: „Estas klare por mi, ke la venko de Esperanto dependos de tio, ĉu la bolŝevismo triumfos, kaj povos detruiri nian antikvan kulturon, kaj konstruos novan Esperantan kulturon, . . . aŭ la grandaj nacioj de Eŭropo konservos sian hegemonion, kaj tiam Esperanto mortos . . . En Esperanto — diktaturo, en Okcidentalo (elpensajo de la sinjoro redaktoro) — libereco!“

P. St., L.-K.

Anoncoj.

Familiaj anoncoj senpage. Aliaj anoncoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kromas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.30 dol., 0.50 hfl., 1 nord. kr., 1 All., 1 avis. fl., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fl., 3 lir., 7 fmk., 8 kc., 50 pmk., 75 hung. kr., 250 pmk., 200 adair. kr., internacie 5 ramp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncojn nur post antaŭpago. — Anoncoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

MASKILO. Al s-o Antonio Aleman Ruiz el Habana, Kuba, kaj edzino naskiĝis filino la 1-an de februaro.

LETERVESPERON aranĝos Societo Esperantista de Västerås „La Verda Stelo“, la 25-an de julio 1922. Sendu tiujn lerojn kaj kartojn (markitaj: „Leterveespero“) al s-o O. N.: son lhbarn. Fliskartorget 3, Västerås, Svedujo. Ĉiuj ricevos respondon.

BES-A ADRESARO. Prezo 1.50 avis. fl., germanoj 55 mk. Krome sendkostoj. Havelha ĉe Esp. Eldonejo Buin & Jung, Godesberg, Germ.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Angelo Segarra, str. Claterna 20, Tarrasa, Hisp., luna instruisto, deziras korespondi kun samideanoj ĉiulandaj pri seriozaj temoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj; ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Adolfo van Wesemael, studento, Heernislaan 27, Gent, Belgujo, volas korespondi per leroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl), prefere kun ĉeĥoslovakaj kaj balkananoj.

F-ino Mevo Marubo, Tallina, poŝtkart 6, Estonio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj nur kun marlistoj de la tuta mondo.

Hugo Lederer, Lazare Bělehrad, Bohemlando, deziras Interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn, lerojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiulandaj samideanoj. Prefere fratinojn.

Junaj geedzoj, kiuj laboris en Esperanta Biblioteko de G. Davidov en Saratov, petas bezonatajn Esperantafojn, korespondojn kaj manĝaĵon kompetence je sincera kordanko kaj ĉio interesanta Eksterrusujon (poŝtk. il. kc.). Adreso: Serpuĉov, Moskovakaj gub., Moskovakaja ulica 79/187, M. Hruĵ, G. Siremel, Ruslando.


S-o Paul Söderström, Box 20, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

S-o Einar Karlsson, Rommedalen, P. I. 61, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi.

S-o Volmar Lindman, p. l. 5, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi.

S-o Viktor Tell, Tållberg, Svedujo, deziras korespondi.

Mi deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun samideanoj el ĉiuj landoj.
Henning Halldor, Helsingegatan 9, Stockholm V-a, Svedujo.



Bad Reichenhall, vidata de Kirchberg-Kanzel.

Esperanto
Service Corporation „ESKO“
500 Fifth Avenue New York City
Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiuspecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estos danke ricevataj.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto - Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝargas per la dissendo de cirkuleroj.
Prokuras komercajn adresojn.
Prizorgas la anoncadon en Nederlando.
Interrilatas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.
Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapero.

100 diversaj poŝtmarkoj

de Danzig, Saar, Supra Silezio, Memel en travidebla kovrilo

1 paketo	10 paketoj
100	900

„München Gewerbeschau“	1 serio	10 serioj	100 serioj
1.25, 2, 3, 4, 10, 20 mk.	60	550	5000
„Deutsches Reich“ novaj			
5, 10, 20 mk.	50	460	4400
Ciferoj 5, 10, 15, 25, 30, 40, 50 pfg.		40	350

Ĉio sur blanka papero, akurate stampita. — La prezo en germanaj markoj. — Antaŭpago per banknotoj ĉiulandaj.

Postulu la novan juni-prezaron pri kompletaj serioj de Memel, Saar, Allenstein, Danzig, Supra Silezio, Marienwerder, Schleswig (Slesvigo), Bayern (Bavario), Württemberg.

Kontraŭ mondepono mi sendas kolektojn por elektado. Granda elekto en germanaj poŝtmarkoj, novaj koloroj, „têtes-bêches“.

Korespondado en lingvoj germana, angla, franca, Esperanta.

S-ino Emmy Schultze, Rogzow bei Köslin, Germ.

Anonceloj.

Familiaj anonceloj senpage. Aliaj anonceloj (nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kosta po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 fl., 1 nord. kr., 1 ill., 1 svia. fl., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fr., 3 lir., 7 fmk., 8 kē, 50 p.m., 75 hung. kr., 550 p.m., 500 austr. kr., internacie 5 r.smp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anonceloj laŭdeziro de la abononto, de aliaj ni enpresas anoncelojn nur post antaŭpago. — Anonceloj devas aŭteni 10 tagojn antaŭ publikigo.

UKRAINOJ ATENTU! Kiu scias, kie troviĝas nun Danil kaj Alie Tsibulkin? Antaŭmilita adreso: Alie Tsibulkin, gorod Kolonte Dobre, Stanzi Jafkino, Poŝtova odienja, Hersonski gub. — Skribu al s-o Maks Klepatsch-Tsibulkin, 9, rue des Sources, Genève, Svislando.

KOMERCAJN INTERRILATOJN, eventuale reprezentadon de germaniaj (sakasj) fabrikoj de tolaĵoj, ŝtrumpetoj kaj laŭmoda komercaĵoj por alinjoj serĉas solida importa firmo en Argentino. — Skribu al s-o A. Bartoš, Praha-Nusle 170-62, Ĉeĥoslovakio.

MALALTIGO DE PREZO. Esperantaj INSIGNOJ po 0.20 fl.; 25 insignoj po 0.15 fl. — Uzu la okazon! — Esperanta Domo, 25. l. M. H. Trompstraat, Amsterdam, Hollando.

P. MEDEM, Kaunas, Litovujo, forveturante pro malsano eksterlanden, esperas reveni fine de julio kaj petas prokrete la korespondadon ĝis aŭgusto.

Itala Vino

Unuakvalitajn vinojn de la Piedmontoj kaj Toskanio eksportas al ĉiuj landoj

La Fermo **GIOVARA** Fedele
Via Ciamarella 5, Torino (Italio).

Plej granda seriozeco.
Oni korespondas prefere Esperante.

La Interŝanĝo

Francaj kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, **Béziers** (Hérault),
Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Vlnnet.



Kapablaj reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

Unuakvalitaj

Ŝtalojoj de Solingen:

Raziloj, Razaparatoj, Razilklingoj, Poŝtranĉiloj, Tondiloj, Hartondiloj, je fabrikk-prezo.

Bildoj kaj originalaj specimenoj haveblaj.

Perado per
Komercista Esperanto Grupo
Freiburg i.Br., Germ., Katharinenstr.14.
Aldonu al demando respondkuponon.

NEDERLANDAJ ESPERANTISTOJ! Sendu al mi sur poŝtkarto vian gustan nomon kaj adreson por la preparado de „Nederlanda Esperantista Adreslibro“! — J. B. E. de Koster, 25. l. M. H. Trompstraat, Amsterdam.

GASTIGO DUM LIBERTEMPO. Kiu ĝesamideanoj (Danujo aŭ Hollando) gastigus dum kelkaj semajnoj kelkajn malriĉajn geknabojn senkoste, eble portus vojaĝkoston? Sciigojn petas rekte al s-o Inuisto Alfred Grube, Harburg (Eibe), Germ., Kreuzstr. 1.

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

Kiu sendos 200 nedefektajn poŝtmarkojn el sia lando, ricevos samvaloran kvanton da ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj kaj belegan panoraman karton de mia urbo. — Antonin Uher, Praha, II. Jindřišská ul. 31.

Tutmondaj policistoj korespondemaj pri policaj temoj aŭ interŝanĝemaj Esperantistojn, skribu al Dr. V. Toth, polic-konceptisto, Budapeŝt, 6. ker. kapitanyasag, Hungario.

Stefano Nyiry, polic-oficiisto, Budapeŝt, 6. ker. kapitanyasag, Hungario, deziras korespondi pri policaj, pri ĝia Esperanta movado kaj interŝanĝaj poŝtmarkojn ilustritajn.

S-o Anders Grankvist, Box 166, Korsnäs, Sved., deziras korespondi kun samideanoj (inoj) el ĉiuj landoj, sed precipe kun bontemplanoj en Ameriko, Islando kaj Finnlando.

Mi deziras korespondi kun ĝesamideanoj per poŝtkartoj ilust. (Esp. mk., poŝtmk. bildf.) — Adreso: Neŝo D. Izkovskov, s. Kruŝovica, Plevensko, Bulgarujo.

Rusujo, Tambov, Kronstadtskaja 35, N. Medousov, deziras interŝanĝi Esperantistojn.



Se vi serĉas liveraĵojn por ĉiuspecaj komercaĵoj kaj industriaĵoj aŭ se vi deziras akcepti la reprezentadon de eksport-kapablaj firmoj, turnu vin en via propra intereso al la

**KOMERCISTA ESPERANTO GRUPO
FREIBURG I. BR. (GERM.)
KATHARINENSTR. 14**

kio havas bonajn rilatojn al germanaj industriaj kaj komercaj rondoj. — Perado senkosta. — Al demando aldonu resp.-kup.

HUNGARA VINO.

La Tokaj-Hegyalja-Provincia Vin-komercista A. S. Budapest

malmulkoste

eksportas unuarangajn vinojn al ĉiuj landoj.
(En lastaj monatoj oni sendas al Brazilio, Ĉinio, Nederlando, Germanio.)

— Botelvinoj. —
Mondfamaj „Tokaj“-vinoj!

Seriozaj firmoj kaj reprezentantoj ricevas ofertojn pere de

Paŭlo Balkányi, Budapest VI,
Hajos u. 15.

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabrikaj
antaŭe Henri J. Carels.
50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.
Lunĉejo Carels
(ĉefo: H.A. Scherwächter)
63 Weimarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg; por Vien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeiffer), Wien II/I, Postami 34
Belga: Frans Schoofs, 48, Kl. Beersstraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 28420.

Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenu.

Estona: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast 6, Tallinn.

Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

Franca: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Clidly, Paris 9.

Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.

Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.

Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.

Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuliska ul., br. 1.

Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas, (Kovno).

Polaj: Adolfo Oberromman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 8125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordecklego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.

Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1

U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Grava verko, kiun devas posedi ĉiu samideano:

Dr. Möbusz, Dokumentoj de Esperanto

Prezo 35 gmk., por mezbonvalutuloj 56 gmk., por bonvalutuloj 70 gmk. — Por pakado kaj sendkoston aldonu 7 gmk., negermano 12 gmk.

Esperanto-eldonejo
Butin & Jung, Godesberg, Germ.



Lübeck
Die freie und Hanse-Stadt.

Kiu ne povas viziti la XIV-an en Helsinki, vizitu almenaŭ la Antaŭkongreson en Lübeck, kie li trovos ĝesamideanojn ĉiulandajn!

Petu Aliĝilon de la Kongresa Komitato
Lübeck, Falkenstrato 12.

Josef Eder salutas siajn gekorespondantojn kaj sciigas al ili la ŝanĝon de sia loĝejo. La nova adreso estas: Graz, Lastenstr. 6, dua etaĝo.

F-ilo Josefo Comas, strato Judios 6-1, Manresa (Barcelona), Hispanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj, precipe kun meblistoj en la tuta mondo.

30-jara anglo deziras korespondi kun geksterlandanoj pri liberpenso kaj similaj temoj. Ne interŝanĝas poŝtmarkojn! S-o S. J. Smith, 45 High St., Sydenham, London S. E. 26

Mi interŝanĝas poŝtmarkojn kaj papermonon, ankaŭ sendas poŝtmarkojn kontraŭ papermono de ĉiuj landoj: Lichtenŝtejn, Bjalystok, Sobieska 1, Polujo.

Rusujo, Astrachan, Armjanskij most 111, G. Artemjev, deziras korespondi kun ĝesamideanoj ĉiulandaj, interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilust., Esp. gazetojn, fotojn kaj papermonon aperintan dum la milito.

Korespondadon kun U. D. C.-anoj en la tuta mondo deziras Heinrich Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉel.; interŝanĝas ankaŭ gazetojn kaj broŝurojn.

Pelucchi G., Via Settembrini 5, Milano 29, Italio, interŝanĝas kun ĉiulandanoj Esp. kaj nacilingvajn librojn kaj gazetojn; poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilust. — Korespondas ankaŭ.

Poŝtmark-kolektantoj atentu! Mi serĉas filatelistajn interrilatojn kun la tuta mondo. Mi ŝanĝas kaj vendas. Mi posedas grandan aron da belaj aŭstria poŝtmarkoj. Kontraŭ referencoj mi forsendas belajn elektaĵojn de aŭstria poŝtmarkoj, por aĉeto aŭ vendado. — Josef Kolhofer, Wien 18/4, Zehetnergasse 87.

Du amikoj: Theodor Weder, Blumenstr. 747, kaj Hermenn Scherbaum, Telchstr. 588, Gross-Schönau, Saksujo, Germ., deziras interŝanĝi ilust. poŝtkartojn kaj leterojn. Ili ankaŭ volonte skribos pri naciaj kutimoj, literaturo, naturo kaj politiko kun ĉiulandanoj.

Rusio. Astrachan, Pristanskaja ul. 6, F. V. Savin. — Mi deziras korespondi kun ĉiulandanoj kaj petas sendi komerc-informojn pri ĉiuj komercaĵoj por komercinformo.

K-do Bazilo Averin, Rusujo, Astrachan, 6 uc, 5 Barakalda, n-o 80, deziras korespondi pri ĉiuj demandoj per leteroj, ilust. poŝtkartoj, kaj interŝanĝas poŝtmarkojn, Esp. gazetojn, literaturon. Interesiĝas pri astronomio.

Otto Schmidt, Frelheit, Trautenu, Ĉeĥoslovakio, sendas por 50-200 nedefektajn poŝtmarkojn (ankaŭ duobla) la saman kvanton da ĉeĥoslovakaj aŭ aŭstriaj.

Du amikoj deziras korespondi kun la tuta mondo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn. — Josef Ducka kaj Josef Hulzdil, ambaŭ en Schatzlar, Ĉeĥoslovakio.

S-o J. B. E. de Koster, M. H. Trompstraat 25. l., Amsterdam, Holland, deziras ŝanĝi ĝesamideanojn fotografarojn.

Filatelistoj, kiuj sendas al mi 50 aŭ 100 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos la saman kvanton de mia lando kaj aliajn de Suda Ameriko. — Eŭropo. Azio dum la milito. — F. R. Varela, San Francisco 824, Buenos Aires, Argentina Respubliko.

Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergstrasse 54, deziras korespondi per ilust. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe eksteriropaj. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn.